BULTENO DE ESPERANTO SOCIETO DE PORTO ALEGRE.

LIGA BRASILEIRA DE ESPERANTO
Brazila Esperanto-Ligo (BEL)
Praça da República, 54 - 2º
20211 - Rio de Janeiro - RJ

JULIO DE 1985

40

En la jaro de la kvardekjarigo de ESPERANTO SOCIETO DE PORTO ALEGRE - ESPA - ekaperas ĝia monata bulteno

Ni esperas teni la saman, ĝis tie ĉi , plenuman redakt-linion cele la informigon de nia legantaro kaj kontentigon de ties scivolemo pere de artikoloj zorge redaktitaj, sciigante Vin precipe pri la enstata kaj enlanda movado.

Promesplena kaj portanta legindaj novajoj estas en Viaj manoj la debuta numero de nia bulteno KONTAKTILO.

Bonan Profiton!

Monata bulteno eldonata de ESPA- Korespond-adreso:
Rua dos Andradas, 1135 S/1704 -Porto Alegre
(RS) Telefonnumero:(0512)25.3941

MONATA BULTENO - Jaro II - N-ro 14/85 - Porto Alegre - RS - Cr$ 500



Belo Horizonte

De la 17a ĝis 21a de julio okazos en Belo Horizonto(MG) la 21ª Brazila Kongreso de Esperanto,kies organizado estas sub la respondeco de Belorizonta Esperanto Asocio.

"Survoje al la Centjara Jubileo-Esperanto sur la Stratoj" estas la temo de la kongreso kaj laŭ ĉies espero,ĝi malfermos novajn vojojn rilate la progreson kaj la interkompreniĝadon en la esperantista medio.

Ni paŝon post paŝo alproksimiĝas de la centjariĝo kaj ankoraŭ,bedaŭrinde, frontas inter la estraranoj de asocioj la memamon, kio pendigas la movadon je iliaj pantalonaj randstrioj, kvazaŭ ĝi ne estu amaso da pensantaj kaj bonsencaj personoj.

Jen niaj esperoj deponataj sur la Brazila Kongreso. Bonaŭgurojn ni sendas en la Kongreson.

Espereble la rezultoj estu kontentigaj kaj promesplenaj cele la enuigon de la enlanda movado.

Ĉion ni faros je nia flanko por ĝia sukceso.

JAM 300 PERSONOJ ALIĜIS AL LA
21-A BRAZILA KONGRESO DE ESPERANTO
EN BELO HORIZONTE!
KAJ VI??????

ANTARKTIKO

Lastan someron, la stacio"Comandante Ferraz"estis pligrandigita kaj muntempe posedas ĉ.30 ĉambretojn utiligatajn kiel dormejojn,necesejojn,riparejojn kaj laboratoriojn por la esploroj tie okazantaj. Okupata nur somere,la brazila stacio permesas la disvolvon de interesaj kaj gravaj sciencaj projektoj en la kampo de la meteorologio kaj sciencoj pri alta atmosfero;de la zoologio pere de studoj pri birdoj,mamuloj,fiŝoj, kaj aliaj maraj organismoj kiel la krill;de la botaniko pere de la karakterizo de muskoj,likenoj kaj gramenacoj;de la geologio kaj paleontologio, pere de la konado kaj priskribo de diverstipaj vulkanaj rokoj kaj similaj, abundantaj en la areo, kaj kolektado de fosilioj; de la hidrometrio,de la psikologio kaj medicino homaj,ktp.,donante oportunojn pri plibonigo al multaj sciencistoj naciaj,kaj samtempe,plenumante la punktojn de la Antarktika Traktato.

Al Antarktika Stacio Brazila la vojaĝo de la sciencistoj povis esti farata per la ŝipo"Barão de Teffé" kaj per aviadiloj"Hercules C-130" de Aera Brazila Entrepreno(FAB). La elekto de tia aeroplano estis pro ĝia kapacito enteni multkvantan ŝarĝon kaj ĝia facileco manovri sur mallongaj rulvojoj kaj malbone zorgitaj kiel la trovataj en Antarktiko.

Elirante el Rio de Janeiro kaj prenante esploristojn kaj sciencajn instrumentojn en São Paulo kaj Porto Alegre,la unua etapo de la flugo direkte la glacian kontinenton,estas farata ĝis Punta Arenas,la plej suda urbo de Ĉilio,ĉe la marĝenoj de Markolo de Magalhães,atingata post 6 horoj kaj duono. Situanta je latitudo proksimume 55° sude,la urbo havas temperaturon ĉiam malaltaj,eĉ somere,kiam la meza ĉ. la 10°C. Dum la plej longa parto de la jaro Punta Arenas kovriĝas per neĝo. La blanka kaj unutona pejzaĝo rezultanta vekas en la loĝantoj grandiozan neceson pligajigi la ur

Daŭrigo sur la 7ª paĝo



Ido de pingvino petas manĝaĵon al sia patrino, kiu manĝigas ĝin per manĝaĵo tenita en sia buŝo. Malsupre: Mara elefanto kaj pingvino, reprezentantoj de la abunda faŭno de Antarktiko.



Pezaj veturiloj uzataj en la pola stacio:levmaŝino instalita sur kamiono kaj amfibio"(tiel nomata ĉar ĝi uzeblas tiel surtere kiel surakve). Malsupre:Vidiĝas vestoj taŭgaj por la Antarktika klimato kaj veturiloj por la alilokigo de la esploristoj,proksime de la pola stacio.

Klubo

Kelkaj paroloj:

1.La arto interparoli:diru kion vi volas,tamen lasu la kunparolanto(j) ankaŭ paroli,diri ion-li/ili ankaŭ havas ion direndan kaj aŭskultendan.
2.Ne interrompu kompletan tutaĵon-kelkaj aferoj ne direblas en 1-2 frazoj;permesu eldiri ĉion ĝis la fino,ne malpacienciĝu,sed aŭskultu atente kaj ĝentile.
3.Respektu la aliulajn vidpunktojn,ili egalrajtas kiel la viaj;kaj evitu ofendi aŭ ŝoki lian mem-amon kaj konvinkojn.Se li estas tro sektema,religie,politike aŭ filozofie,ne parolu kontraŭ liaj plej flegataj ideoj,liaj kvazaŭsav-tabuloj.Lasu la aliajn sekvi la vojojn far ili elektitajn.
4. La vero havas multajn aspektojn kaj estas rigardata laŭ diversaj manieroj,pro la diverseco de la mensoj kaj kutimoj-unu sama koloro kvankam same vida ta havas multajn nomojn laŭ la lingvoj de la mondo. Ĉiu ŝajne malsameco venos al la nura fina vero.

5"La homoj eraras ne ĉar ili opinias,ke ili scias, sed ĉar ili opinias,ke la aliaj ne scias". Toleremo estas esenca en kunvivado;memamo ne tuŝebla. Deziri ndas,ke la interparola nivelo estu valora,kulture. Ĝentilec-esprimoj ne estu forgesataj: Hola(Bonan Tagon)/ Revidon./ Bonvolu./ Danke./ Permesu./Pardonu. Kiel vi Fartas? / Plezuron.

6.Du aĵoj kiuj mortigas interparolon:
a)Paroli nur pri si mem-pri siaj problemoj kaj kvalitoj;
b)Uzi la vorton dum la tuta tempo,malhelpante la aliajn paroli.

7.Neniu ŝatas aŭdi malagrablaĵojn aŭ esti malrespek-

bon kio vidiĝas per la koloreco de la domoj.

En Punta Arenas la restado daŭru unu aŭ pliajn tagojn,kio dependos de la tempokondiĉoj en la Antarktika Kontinento. Post pli du horoj kaj duono je flugo oni alvenas al flughaveno Marsh de Aera Ĉilia Entrepreno,lokita en Insulo Reĝo George,nordokcidenten de Duoninsulo Antarktika.

La Flughaveno Marsh,la plej granda el la insulo,estas la nura havanta sidiĝan rulvojon kaj posedanta eblecon ŝirmi pli ol tricentpersonoj. En la sama loko troviĝas la stacioj"Eduardo Frei",ankaŭ ĉilia, kies ĉefa okupo rilatiĝas al meteorologio por la areo kaj la Rusa,Bellingshausen.

De tiu loko ĝis la Brazila Stacio"Comandante Ferraz",starigita interne de la Golfo de Almirantado (Admiralty Bay),la vojaĝo estas farata per la ŝipo "Barão de Teffé".

(Daŭrigota)

Reviziinte ...ni konstatis tajperaron sur la 12º paĝo de la lasta informilo,en la lasta linio de la antaŭlasta paragrafo.Bv.,kie Vi legas"mi ne iron..", legi"mi ne iros.." Dankon!..

tata,kaj neniu ŝatas ricevi ordojn;multaj volonte helpus sen ĉi tiuj malbonoj. Kelkaj ne petas,ili ordonas;la envio malhelpas kunlaboron kaj disigas. Elstariĝemo kaj envio difektas ĉion(oni estu simplaj kaj memkontentaj).

(Kunlaborajo de Prof.Boris Eston.)

Daŭrigo

ESPERANTO KAJ LA TRIA MONDO.

Zhang Qicheng,
ĉina esperantisto.

Estas ĝojinde,ke aŭdiĝis la forta voĉo de irananoj: Ni bezonas Esperanton por akiri sciojn pri scienco kaj tekniko! Tio ĝuste estas la urĝa postulo de la popoloj de la tria mondo al Esperanto. Nun tre malmultaj estas la Esperantaj eldonaĵoj pri scienco kaj tekniko,kiuj tute ne povas kontentigi la bezonon de la tria mondo. Se Esperanto povos plenumi ilian bezonon iom post iom tiuflanke,ĝi certe populariĝos en la tuta mondo. Mi povas senfanfarone aserti, ke milionoj da ĉinoj eklernos Esperanton, se la nombro de ĝiaj eldonaĵoj pri scienco kaj tekniko atingos dekonon de tiu de la anglalingvaj eldonaĵoj. Tial oni devas multe klopodi por servigi Esperanton sur tiu kampo. Pri tio jam komencis atenti UEA kaj la fondo de la Scienca Eldona Centro en Budapeŝto pruvis ĝian klopodon. Ja bona komenco,tamen nur komenco. UEA kaj aliaj internaciaj Esperantaj organizoj kaj personoj ankoraŭ devas multobligi sian penadon en tio.

Nun la forto de Esperanto estas ankoraŭ tre malgranda, ne reale estus, se oni postulus, ke Esperanto rapide disvastiĝu en la tria mondo,ĉar ne nur mankas necesaj objektivaj kondiĉoj sed ankaŭ Esperanto mem ne posedas la necesajn subjektivajn kondiĉojn. Sed mi profunde kredas,ke nepre venos la tago,kiam Esperanto bone aliancigos kun la tria mondo. Kun disvolviĝo de la batalo de la tria mondo por egalrajteco en internaciaj aferoj,Esperanto certe estos konata kaj akceptata de ĉiam pli multaj landoj de la tria mondo kiel lingvo egalrajta por ĉiuj. La tria mondo estas plej fidinda aliancano de Esperanto.

(Daŭrigota)